Elias Salomon,

# Fiducit!

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

*"Fiducit" estas vorto el al studenta lingvaĵo el la 18a jarcento, kiu estas mallongigo de la latinaj vortoj "Fiducia sit". Tiuj vortoj signifas laŭvorte tradukite: "Estu konfido" La esprimo estis uzata de la studentoj dum ilia kunvenoj en la senco de "Konsentite".*

1. Kunuloj tri kunsidis
For de bruanta mond',
Kaj iris la pokalo
Kun ĝojo en la rond'.

2. Ridadis ili trinkante,
Senzorge kun kontent'
De l'mondo tagmizero
Forflugis kun la vent'.

3. Ekmortis unu el ili
Kaj dua la kunul' -
La tria nun solece
Restadis jen trinkul'.

4. Kaj kiam la hor' alvenis
De tiu kolegi',
Li igis plenigi pokalojn
Kaj kantis kun energi'.

5. Sidante iam kun liro
Ĉe manĝo en la hal',
Subite falis larmo
En vinon de pokal'.

6. "Al vi, kunuloj, trinkas
Mi nun; sed kial vi
Silente nek moviĝas?
Pro kio restas mi?"

. . .

Elias Salomon,

# Fiducit!

1. Es hatten drei Gesellen
ein fein Kollegium.
Es kreiste so fröhlich der Becher
in dem kleinen Kreise herum.

2. Sie lachten dazu und sangen
und waren froh und frei,
des Weltlaufs Elend und Sorgen,
sie gingen an ihnen vorbei.

3. Da starb von den dreien der eine,
der andere folgte ihm nach,
und es blieb der dritte alleine
in dem öden Jubelgemach.

4. Und wenn die Stunde gekommen
des Zechens und der Lust,
dann tät er die Becher füllen
und sang aus voller Brust.

5. So saß er einst auch beim Mahle
und sang zum Saitenspiel,
und zu dem Wein im Pokale
eine helle Träne fiel.

6. Ich trink euch ein Schmollis, ihr Brüder!
Wie sitzt ihr so stumm und so still?
Was soll aus der Welt denn noch werden,
wenn keiner mehr trinken will.

. . .

7. Jen glasoj tri eksonis
Kaj malpleniĝis du:
"Al via, gaja kunulo!" –
- Li jam ne trinkis plu! -

*Traduko de la Germana poemo "Fiducit!" de* Elias Salomon *(∗1814 – †1885) en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919) en 1907.*

*Arg-84-168 (2004-03-26 20:56:02)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro "Esperantista Kantaro", kiu enhavas tradukojn de germanaj kantoj. La tradukoj estas faritaj de Ludwig Emil Meier. La libro estas eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann (Steglitzer Str. 44, Berlin, Germanio).*

7. Da klangen der Gläser dreie
und wurden mählich leer:
"Fiducit, fröhlicher Bruder!"
Der trank keinen Tropfen mehr.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Elias Salomon *(∗1814 – †1885), publikigita 1834.*

*Arg-84-167 (2003-11-09 22:26:25)*